Per karaktero de melankolio apudmara, malluma, naskita inter la bruego de ventoj, inter la balanciĝado kaj muĝado de ondegoj, distingigas du skizoj, „*La sopiro*“ kaj „*La lasta*“. En „*Fumejo de l' opio*“ Reymont priskribas plastike la statojn de narkota ebriiĝo, en kiun enprofundiĝas en malpermesitaj parizaj restoracioj la gastoj, ĝuantaj tiun-ĉi azian, venenantan agrablaĵon. En la „*Idilio*“ ni havas la romanon de medicina studento kun bier-fraŭlino, kelnerino el restoracio, interrompitan per tipa niatempa disonanco. La fraŭlon oni arestis, ĉar li implikis sin en iajn politike-partiajn laborojn, sekve la idilio interrompiĝis. La simpla historieto el varsoviaj stratoj estas ornamita per poezio de juneco, per artismo, kun kiu la figuroj estas prezentitaj, per la viveco de l' rakonto, kaj ĝi estas libera de la enuiga grizeco de la ordinaraĵaj pentraĵetoj el la malgrandurba vivo.

Perloj de tiu-ĉi kolekto estas sendube la priskriboj de l' japana heroeco, kaj precipe la grandioza, plena de koloroj kaj perspektivo, pentro de l' cirka amuzo hispana. La aliaj estas skizoj, desegnitaj kun svinga forto, bagateloj, kiuj naskiĝas en la laborejo de l' artisto en la momentoj de kreaĵinteraktoj, dum la laboro super grandaj verkoj. Estas certe, ke eĉ en la skizoj, artiste malpli prilaboritaj, ni sentas pli profundajn kaj fidele transdonitajn tremojn de l' pasio; antaŭ niaj okuloj rapide pretermoviĝas figuroj vivaj, ne literaturaj pupoj aŭ paperaj banalaĵoj. Vera poeto estas Reymont, kiam la kordojn de lia animo movas impresoj de l' naturo, kiamli pentras la homan animon brile blindigitan per la nemezurebleco de l' monda potenco aŭ frakasitan kaj timigitan ĉe l' vido de la muĝantaj, senkateniĝintaj elementoj, subjugitan per la spiro de l' uragano kaj de ĝia sovaĝa furiozeco“.

A. Grabowski.





Władysław St. Reymont.

# Ave Patria, Morituri te salutant...

(fino)

Jam sep da ili kuŝis sur la fundo de l' mallarĝa faŭko, kaj la oka agoniis disfrakasita per kugloj, kiam Hiroŝe ekkriis al la direktilo:

— Kaj nun ni!

— La lasta — ekmurmuretis kiel eĥo, Kataoka.

Ekgrincis ŝraŭboj, la dua brulŝipo preterglitis senbrue, ekkrakis la ĉenoj, jungiĝis kune flanko ĉe flanko kaj kvazaŭ Lelum Polelum ili ĵetis sin en la batalon al la komuna morto.

La fortikaĵo ĝemis per tondroj, kiel furio, la pluvego da fulmoj trafendis la mallumojn per terura flagrado kaj uragano de kugloj falis senĉese, kiam la lastaj brulŝipoj subite aperis en la lumgarbo kaj saltis al la trairejo per la tuta forto de l' maŝinoj.

— Banzaj! Banzaj! — ili kriis flugante kiel ventego.

Hiroŝe staris sur la kapitana ponteto, malvarma kaj kvietita.

Aro da ŝipoj baris al li la vojon per nigra fulmanta nuboj.

— Fajron! — eksonis la signalaj trumpetoj.

Ektondris pafadoj, ekbruis pomponoj sur la pontetoj kapitanaj kaj iaj restaĵoj eklumetis super la ondoj, iaj kriegoj nehomaj aŭdiĝis en plaŭdoj kaj tondroj, sed la brulŝipoj kuris kiel ventego, ruinigante ĉion intervoje. Ili kuris al morto kaj venko.

Kaj la batalo fariĝis jam mortfuriozo, kugloj traboris la ferdekojn, vomante per ŝtalo kaj fajro, frakasis la flankojn de l' ŝipoj, kaj falante per senĉesa hajlego kvazaŭ per fera draŝilo dispremendis ĉiun objekton.

Uragano de fulmotondroj falis kvazaŭ superakvego, la homoj mortis ĉirkaŭe, falante kiel subtranĉitaj arboj sur la ŝtiparojn ankoraŭ tremantajn, ili falis en la maron kiel ŝtonoj, volviĝis de doloroj en sangaj kotejoj inter amasegoj da korpoj terure disfrakasitaj, sed la restintaj forkaptitaj de batala ventego, blindigitaj de fumo, ebriaj de mortiga furiozo, batalis ĝis la lasta elspiro, ili batalis jam senkonscie nur pro morto kaj heroeco. Eĉ

la mortige vunditaj, preskaŭ mortantaj, rampante inter la restaĵoj de korpoj kaj kugloj, pafis ankoraŭ el karabenoj kaj ĵetis manajn grenadojn sur torpedŝipojn, vagantajn ĉirkaŭe kvazaŭ arego da malsataj monstroj.

La brulŝipoj fariĝis jam kvazaŭ vulkano, ĉar ĉiumomente ili eksplodis per fajraj kaj feraj kolonoj, ĉiumomente elŝprucis brulegoj per fontanoj, ĉiumomente leviĝis supren sangigitaj frakasitaĵoj de korpoj, de lignaĵo kaj ŝtalo kaj la senĉesa tondro bruegis kvazaŭ en kratero...

Jam eksilentis signalaj trumpetoj, eksilentis pomponoj sur la kapitanaj pontetoj, ekmutiĝis kanonoj disbatitaj, sed la brulŝipoj ĉiam ankoraŭ iris antaŭen; jam malfortiĝis iliarapideco, jam ili kliniĝis flanken, tremantaj kvazaŭ en agoniaz ekstremitoj, ili estis jam kvazaŭ nudaj kadavroj disŝiritaj kaj dispremitaj, sen ferdekoj, sen kanonoj, sen kamenoj, sen bordoj kaj pontoj, sed plenaj de mortigaj vundoj, de sango, de ĝemoj kaj de nepriskribebla teruro kaj sankta furiozeco...

Ili jam fulmrapidis per la restfortoj de agoniantaj maŝinoj kaj mortfalantaj homoj...

Alvenis la lasta momento!

Kaj Hiroŝe jam forgesis pri si, li estis nur kvazaŭ nerebatebla mortfrapo.

— Pli rapide! Pli rapide — li kriis nur de tempo al tempo tra la tubo al la malfortiĝantaj maŝinoj.

Li vivis ankoraŭ, li batalis ankoraŭ, li ordonis ankoraŭ, li mortigis ankoraŭ mem, sed jam ia kosma ventego portis lin super ĉion, disblovis lin en senfinajn spacojn kaj dronigis en neesto...

Li vivis ankoraŭ kaj io suferigedolĉa trapenetris lian koron, en la okuloj fiksitaĵoj en fumojn kaj fajrojn naskiĝis vidado de aferoj nekompreneblaj, kaj sur la lipoj ekfloris dolĉega rideto de salutoj.

Li komencis jam tremi kvazaŭ ombro malaperanta en senfino, li transformiĝis en sonĝadon pri si mem...

Kaj li estis nur ventego de sento, ĝoje pereanta en kvieto...

Sed li staris senmove inter falantaj grenadoj kaj zorge atentis ĉion, kaj kvan-



kam sango superverŝis lian vizaĝon, li ekrimarkis la lastan limon, donis signalon al la maŝinoj, la brulŝipoj subite ŝuprenleviĝis kaj falis larĝe kiel kadavroj en malfermitan tombon...

— Kingstonojn! — aŭdiĝis la lasta ordono.

One ne bezonis jam dronigi. La brulŝipoj enprofundiĝadis mallaripe kaj senbrue en la furioziĝantaj abismojn, entombiĝis en la akvon kun solena majesteco de l' morto, la maro kun silbo enpuŝigis trans la disŝiritaj flankoj; la ondoj superverŝis la trunkon... jam dronis la restaĵoj de ŝipbordoj... jam defluis la kadavroj kaj vunditoj... jam la morto finis sian senkompatan falĉadon.

Kaj nur sur la mastoj de la lasta ponto, sub la suna, disŝirita flago, alpremigi ankoraŭ areto da homoj batalantaj kun la morto.

Ili malsuprenfalas tamen ĉiam pli kaj pli, kugloj frapis ilin senĉese, grenadoj disŝiris tiujn ĉi malfortajn araneaĵojn, sur kiuj ili pendis; ĉiumomente iu forlasis maston kaj rebatiĝante de ŝnuregoj, falis kvazaŭ pafita birdo...

Nur sola Hiroŝe, malgraŭ la vundoj, sin tenis ankoraŭ sub la flago kaj per la restoj de l' fortoj, voĉo kaj konscio, kriis de tempo al tempo:

— Banzaj! Banzaj!

Al li respondis kartoĉoj kaj senŝesa siblado de kugloj kaj plaŭdado de ondoj.

La hela tago leviĝis pli kaj pli supren...

Kaj li malsuprenfaladis malrapide, la akvo ĉirkaŭprenis liajn piedojn; li rampis sur la pinton de l' masto kaj alligis sin al ĝi per la restaĵoj de l' flago, sed la akvo ĉiam pli leviĝis, senkompate, ĝi jam atingis lian zonon... leviĝis al la brusto.. kraĉis sur lian vizaĝon... rampis al la brakoj... lekis lian kolon... kaj komencis tuŝeti la buŝon per glacia maldolĉa kiso... sur la okulojn ĝi metis verdajn, malvarmajn naĝilojn.. kaj murmuretis al li ian kanton... kvietigantan, kanton de forgeso...

Per lasta superhoma ekpeno, li leviĝis iomete, elŝiriĝis ankoraŭ por momento el la ĉirkaŭpreno de l' morto kaj turnis la vizaĝon orienten, tien, de kie fluis rozkolora mateno, kie la suno leviĝis jam super la bruegantaj ondoj.

Li ekrigardis kun entuziasmo sur tiun flamantan plejsanktan vizaĝon kiel sur la dian kompatplenan vidaĵon kaj liaj okuloj ekfrapetis kiel birdoj, ekpafis per fulmoj de feliĉo kaj dankemo kaj forflugis per senmorta flugo en la senfinon...

La altiĝintaj ondoj kaptis lin en siajn mallumajn cirkaŭprenojn kaj forportis sur la verdaj dorsoj al la suno, al la malproksima patrujo.

Ĉio estis finita.

Ili mortis sur siaj ĉerkoj — brulŝipoj; mortis ĉiu ĝis la lasta.

Ave patria!...

*Lozo.*

Władysław St. Reymont.

## LOS TOROS.

(fino).

Post iom pli longa interrompo komenciĝis la tria batalo.

La amfiteatro estis tiel forte ekscitita kaj flamigita, ke nur la vido de nova bovo iom ĝin trankviligis.

La bovo ekkuris el la stalo gaje, saltante kvazaŭ ellasista sur paŝtejon; ĝi estis iomete pli longa ol la antaŭaj, palflava, kun orkoloraj flankoj kaj piedoj.

— Cenicerio! Cenicerio! Ekkriis al li ia ploranta voĉo.

Ĝin superbruis sibloj kaj krioj.

La batalo komenciĝis laŭ la kutima ordo, sed ĉiumomente, de la alia flanko de l'cirkò aŭdiĝis tiu sama ploranta, dolorplena voĉo.

— Cenicerio! Cenicerio!

Fine la bovo ekaŭdis ĝin; ĝi haltis subite kaj respondis per tirata muĝado.

Vane incitadis ĝin ruĝaj tukoj kaj pikadoroj penis ĝin forpeli de loko, vane oni devigis ĝin batali; ĝi staris obstine, kvazaŭ volante scii pri nenio, ĝi nur turniĝis ĉiufanken kaj subaŭskultante muĝetis.



Maltrankvilo trapenetris la popolamasojn, miloj da malamaj rigardoj trapikis ĝin mortige, disŝiris, kaj ia juna belega knabino elkliniĝis el la logio kaj kun preme fermitaj pugnoj, kriis:

— Brutaĉo! Draŝu ĝin per vipoj!

Kaj el multaj lokoj oni kriis jam senpacience:

— Alian bovon! Tiu ĉi taŭgas nenion, malbona! Alian!

La bruego potenciĝis ĉiam pli, oni jam komencis ĵeti sur ĝin ĉapelojn kaj bastonojn, kraĉis per malestimo, kiam la bovo kvazaŭ rekonsciĝis kaj lavango ne defalas tiel fulmrapide, kiel ĝi ĵetis sin sur la tukojn de banderileroj.

Krio de teruro elŝiriĝis el ĉiuj brustoj.

Ili tamen sukcesis forkuri, kaj la bovo volviĝis kvazaŭ trombo, furiozis, dispeladis homojn, disŝiradis la tukojn per la kornoj, trapikis ĉevalojn kvazaŭ malplenaĵajn vezikojn, renversis, piedpremis kun malamo, revenis kaj ree forkuris, batis kaj sangiginta, furiozita, elspiranta per mortigo, trakuris la arenon kun surda piedbatado kaj revenadis tiel rapide, deflankiĝis tiel neatendite, atakis tiel furioze, ke ĉiumomente tukoj kaj banderileroj disflugis kiel ektimigitaj kokinoj.

Fine la cirko komencis sibli kaj moki:

— Malkuraĝuloj! Vi taŭgas nur paŝti bovinojn! Mulgardistoj! Azenkondukantoj!

Tiam eliris unu banderilero, pala kiel kadavro kaj iris renkonten krazaŭ al certa morto.

La cirko ekmutiĝis de kortremo.

Kaj li centfoje ĵetis sin rekte sur la kornojn kaj maltrafis, apenaŭ savante la vivon ĝis fine per ia malespera ekmovado li sukcesis enpiki en la bovon du flagetojn.

Oni rekompencis lin per aplaŭdoj, sed la besto kvazaŭ furioziĝis ĝis limo, ĉar kun terura muĝego, kovrita per sango kaj ŝaŭmanta ĝi ĵetis sin sur la elirantan kontraŭ li espadan tiel rapide, ke tiu lasta kun granda malfacilo apenaŭ sukcesis sin savi de la neantaŭvidita ekbato.

Komenciĝis mallonga furioza duelo.

La espada ekatakis ĝin per terura neevitebla ekbato, sed la rebatita armilo falis el lia mano kaj li ruliĝis flanken, gratita de la kornoj.

Oni donis al li alian spadon.

Flanke garde atentis disentenditaj tukoj.

Sed la bovo ne permesis sin forlogi per svingataj tukoj, atentis neniun kaj nur atakis la espadan kun nepriskribebla furio, batis lin kvazaŭ tondro, ĵetis sin sur lin tiel furioze kaj per tiaj rapidaj saltoj kaj tiel seninterrompe, ke tiu apenaŭ sukcesis elturniĝi el la ĉirkaŭprenoj de l'kornoj.

En morta silento bolis tiu ĉi terura batalo. Oni rigidiĝis sur la lokoj; nek unu ventumilo ekbruetis, nek unu kapo ektremis, oni rigardis kun haltigita spiro de atendo...

La espada iom post iom transiris al atako kaj fine surfalis la bovon tiel malproksime, ke la besto haltis por momento kaj, leviĝinte preskaŭ arke, ĵetis sin kontraŭ lin kun la substarigitaj kornoj:

La spado ekbrilis mortige por lasta ekbato...

Subite en varmega silento, ie proksime, eksonis mallaŭta kortrapenetranta sonorileto...

La espada genufleksis senkonscie, mallevante la spadon kaj la bovo kvazaŭ subite mortis en sia movo, restis arke fleksita, kunvolvita, kun la kornoj pretaj al atako, kelkajn colojn antaŭ la brusto de l' genufleksinto.

La amfiteatro ankaŭ koloniĝis kaj dum longa momento restis sen movo kaj vorto, la homoj kvazaŭ rigidiĝis admirante la miraklon, multaj kun la suprenlevitaj manoj, multaj en duonspiro, multaj kun larĝe malfermitaj buŝoj.

La korpenetranta, arĝentsonora tinto de l' sonorileto tremis en la trairejo post la bariero kaj iom post iom malproksimiĝis, foriris.

— Tio estis pastro, kiu iris kun la Sinjoro Jesuo al la mortanta Pikadoro.

Ia mistika, timoplena impresio pleniĝis ĉiujn korojn, miloj da homoj falis sur la genuojn, oni sin batis en la brustojn, malkovris la kapojn kaj tie kaj ie leviĝis murmureto de preĝo kaj varmega sopiro.

Subite en tiu ĉi preĝa silento, eksonis laŭta plorema voĉo.

— Cenicerio! Cenicerio!

Kaj iu infano saltis trans la barieron, aperis sur la areno kaj ĵetis sin sur la kolon de l' bovo.



— Favoron! Favoron! Li ekriis per la tuta forto.

La tuta amfiteatro salte leviĝis.

— Ĝi estas mia Cenicerio! Favoron! Favoron!

Li kriis malespere, furie kaj plena de timo kaj ĉirkaŭprenis la sangantan kapon de l' bovo ŝirmis ĝin per sia korpo, kaj ĝemis mallaŭte.

Leviĝis terura bruego, ĉiuj manoj etendiĝis kun peto kaj ĉiuj buŝoj kriis:

— Miraklo! Ne mortigu! Favoron! Ne mortigu!

Oni donacis al li la vivon.

Ili eliris jam kune inter surdigantaj aplaŭdoj. La knabo, ne ellasante la kornojn de l' amiko, ploris per ĝojaj larmoj.

Kaj jen la mallonga, vera kaj simpla historio.

Ili estis amikoj el paŝtejo, dividis bonan kaj malbonan sorton, kaj varmegojn, kaj ventegojn, kaj pluvojn; dum malvarmaj vintraj noktoj la bovo alvenadis al estingiginta fajrujo, kuŝiĝis en cindro apud la knabo kaj varmigi lin per sia korpo, kaj kiam ĝi atingis kvin jarojn kaj oni kondukis ĝin al morto, la paŝtisto ĵetis ĉion kaj iris liberigi sian amikon.

Lin savis la nobla koro de l' Hispana popolo.

La sekvantaj bataloj iris jam laŭ la kutima ordo sen eksterordinaĵoj.

*Lozo.*

## 100 proverboj el la „Proverbaro” de M. Zamenhof

(Fino).

### Praktikaj konsiloj.

Ne kedu al parolo sen propra kontrolo. Konfidu, sed vidu.

Tro da konfido kondukas al perfido.

Ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate.

Al amiko nova ne fidu sen provo.

Ĉiun demandu, sed mem al vi komandu.

Fidanta al vorto atendas ĝis morto.

Ne ĉiu raporto estas vera vorto.

Hazardo estas malbona gardo.

Malpli esperu, pli konsideru.

Kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas [per bastonoj].

Kiel akirite, tiel perditu.

Kia la semo, tia la rikolto.

Singardeman Dio gardas.

Ne estas piediranto kolego al rajdanto.

Por pot' argila poto fera estas najbaro [dangera].

Per insulto kaj kolero ne klariĝas la afero.

Kiu koleras, tiu ne prosperas.

Ne laŭdu la tagon antaŭ vespero.

Por vendisto mensogo estas necesa apogo.

### La virino.\*

Kie regas virino, malbona estas la fino.

Se edzino ordonas, domo ordon ne konas.

Edzin' admirata — edzo malsata.

Virina lango buĉas sen sango.

Larmo virina baldaŭ sekiĝas.

Rol' de l' virino — bona mastrino.

### D i o.

Se amas Dio, prosperas ĉio.

Dio batas, Dio kompatas.

Dio donis infanon, Dio donos por ĝi panon.

Se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos.

Ĉiu por si, por ĉiuj Di'.

Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu.

Dangero sieĝas, al Dio ni preĝas—dangero [ĉesas, ni Dion forgesas].

Dio ne perfidas, se homo lin fidas.

### Ŝajno trompas.

Ne ĉio brilanta estas diamanto.

Ne ĉio utilas, kio brilas.

Granda nuboj, malgranda pluvo.

Granda telero, malplena kulero.

### De omnibus rebus et quibusdam aliis.

Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.

Post brua vento subita silento.

Ne povas ĉiu homo esti pap' en Romo.

Ne helpas spegulo al malbelulo.

En trankvila vetero ĉiu remas sen dangero.

Ĉiu tajloro havas sian tranĉmanieron.

Se forestas la suno, sufiĉas la luno.

Laŭdu la maron, sed restu sur tero.

Tablon ornamas ne tuko, sed kuko.

Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas.

Ni forgesas averton, ni memoras la sperton.

Li estas preskaŭ mia frato: nepo de kuzo [de onklo de konato].

Pli kara kapo, ol ĉapo.

Pri la lupoj rakonto, kaj la lupoj renkonte.

\* Mi ne kuraĝas ŝanĝi la proverbojn, kvankam ili estas tiel malfavoraj por la virinoj. Kiu deziras, povas ilin anstataŭigi per jenaj: Kie regas virino, bona estas la komenco kaj bona la fino. Se edzino ordonas, domo ordon konas, k. t. p.—Kabe.



Kornel Ujejski.

## L A Z A R A .

Ho, sultanino, harem-trezoro!  
Peri, ho stelo! al ora floro  
En paradizo simila!  
Kial la frunton kovris nebulo?  
Kial ne brilas via okulo?  
Demandas sklavo humila.

Via kolero — por mi torturo  
Kvazaŭ de l' Ŝaho la silka ŝnuro  
Sendita per la Tataro.  
Sub de kolero via influo,  
Kvazaŭ de l' brula Samuma bruo,  
Ŝiriĝas anim-kordaro.

Kant' Izrafila — via voĉsono!  
Ridet' — pli kara, ol reĝa trono,  
Sed via koro — glacia.  
Ĉu mi venenon kun la mielo,  
El Trebizondo kvazaŭ abelo,  
Suĉos el buŝo la via?

En la Basoro nia ŝiparo  
Por vi distranĉas ondojn de l' maro,  
Serĉante perlojn ĉe bordo;  
Kun riĉaj peltoj lacaj kameloj  
Por vi de sudaj kuras ĉieloj  
Kaj de la neĝoj de l' nordo.

Por vi la ŝalojn tenas bazaro,  
Por vi la greka insulkorsaro  
Rabas riĉaĵon malpie;  
Por vi jen hindaj la elefantoj  
Venas kun perloj kaj diamantoj,  
Lumigi frunton radie.

Por vi kolonoj el la porfiro,  
Por vi tapiŝoj el Kaŝemiro,  
Kiel en templo Kaaba;  
Por vi depagon per odoriloj  
Alportas vagaj de Elbis filoj:  
Senbrida gento araba.

Por vi arĝenta ŝprucas fontano;  
La blankaj kuvoj por via bano  
Estas marmoro plej pura,  
Kaj sur ilia supraĵo brile,  
Al via blanka brusto simile,  
Vejnaro kuras lazura.

Pripensu, suna ho sultanino!  
Kiam vi estis de Kleft' edzino,  
Vi vivis en la mizero:  
Li ne posedis alian havon,  
Nur la pafilon kaj akran glavon,  
Sur ŝtona dormis vi tero.

Vi juna, bela, vi supertera,  
Per pano nigra, akvo rivera  
Kun Klefto nutris vin kune,  
Saltis sur rokoj, dum li sovaĝa  
Per sia glavo buĉis kuraĝa  
Miajn Spahanojn senpune!

Turmento-plena estis la sento,  
Ĝis kiam venis fine momento,  
Kiam ĉe lum' de torĉaro,  
Lian mi kapon vidis en sako  
Kaj vin en mia tremanta brako  
En luksa mia tendaro.

Kaj sur lanuga vi nun kuseno  
Dormas kviete, sub la kurteno  
Per oraj steloj brilanta.  
Kiel malĝojas vi, sultanino?  
Ĉu ensorĉigis vin ciganino,  
Matene preteriranta?

Pro Di'! Sur lipoj sanga makulo,  
Kolere fulmas via okulo!  
Vualon ŝiras man' via.  
Kion deziras via animo?  
Teron mi movos! diru sen timo:  
Tuj suno brulos alia!

Al kio celas via deziro?  
Eĉ se ĝi estas infansopiro,  
Mi ĝin plenumos ĝis fino;  
Sklav' sin al viaj piedoj ĵetas —  
Ho, lin kompatu, ĉar li nur petas  
Vian ordonon, reĝino!

„Mi ne infane ion deziras,  
Omaro!“ — bela grekino diras  
Kun la okulo flamanta,  
Kaj ŝi similis la leopardon —  
„Baŝo! mi volas vian ponardon  
Kun via koro sanganta!“



*N. Larin*



# El la historio de reformoj.

La Esperantistoj de la unua horo, kiel ankaŭ tiuj novaj samideanoj, kiuj studis iom la dudekjaran historion de Esperanto, scias, kiel malfacila estis la komenca propaganda laboro por nia afero. Oni devis forigi tutajn montojn da diversaj malnovaj antaŭjuĝoj. La saĝaj homoj neis la eblecon de artefarita lingvo, neis ĝian bezonon, rigardis la apostolojn de Esperanto kiel utopiistojn kaj kritikis ĉiun unuafoje ekaŭditan esperantan vorton. La profesiaj lingvosciencistoj kondamnis Esperanton, eĉ ne sentante la bezonon esplori la juĝatan objekton.

Nature estas, ke en tiaj cirkonstancoj la nombro de la Esperantistoj komence estis tre malgranda kaj ke ĝi pli grandigadis en la unuaj jaroj tre malrapide, preskaŭ nerimarkeble.

Tia sensukcesa batalado malpacienigis kelkajn el la plej fervoraj propagandistoj kaj ili komencis kulpigi Esperanton mem kaj konvinki sin, ke la mondo ne volas alpreni Esperanton, ĉar ĝi ne estas ankoraŭ perfekta kaj ke oni devas ĝin antaŭ ĉio pliperfektigi. Sed kiamaniere? La genieco de la tuta konstruo estis evidenta kaj neatakebla, sed oni trovis, ke kelkaj detaloj malplaĉas al tiu aŭ alia; oni do opiniis, ke oni devas ŝanĝi tiujn detalojn, ĉar ili malhelpas la rapidan disvastigon de la lingvo internacia. La reformistoj komencis do pripensi la plej diversajn reformajn projektojn, ĉiu laŭ sia plaĉo. Ĉiu reformisto havis propran pretan reforman projekton kaj por ĝi unu adepton, t. e. sin mem; la aliaj volis ĉiu ion alian. Mi mem, fariĝinte ano de reformoj, studis la komparan lingvosciencan romanon el verkoj de Diez, Körting kaj aliaj kaj intencis transformi Esperanton en lingvon iom pli naturan, romane homogenan kaj por la instruitaj lingvistoj senpere kompreneblan. Ĉu la lingvo ricevis la deziritajn kvalitojn mi ne povas juĝi, sed mi ne perdis por unu momento la konscion, ke ĝi fariĝis multe pli malfacile ellernebla

por homoj lingviste ne instruitaj. Vidante, ke ĉiuj eblaj reformoj neniun kontentigas, mi forlasis la propagandon ĝis la tempo, kiam la bonega granda verko „Historio de lingvo universala“ de prof. Couturat kaj Leau min fine konvinkis, ke malgraŭ ĉiuj kontraŭdiroj Esperanto prezentas la solan veran solvon de lingvo internacia. Baldaŭ poste montriĝis, ke Esperanto tia, kia ĝi estis, ricevinte la subtenon de la franca sciencularo, rapide venkis la antaŭjuĝojn, kaj gajnis centmilojn da ĉiunaciaj adeptoj, kiuj sen iaj malhelpoj ĝin uzas nun por buŝa kaj skriba interkompreniĝo.

Esperanto fariĝis sekve lingvo viva, kiu povas disvolviĝi nur tiel, kiel la ceteraj lingvoj vivantaj, kaj samtempe ĉiu diskutado pri sistemaj ŝanĝoj fariĝis tiel same sencela kaj sensenca, kiel estus propono enkonduki sistemajn ŝanĝojn en lingvon anglan, francan aŭ polan. Ĉiu vorto, ĉiu formo gramatika, kiu eble estis kritikebla, kiam Esperanto estis lingva projekto, fariĝis hodiaŭ, per la fakto mem, ke ĝi estas konata kaj uzata de la tuta grandnombra interpopolo Esperanta, esprime bona, kaj ĉiu ŝanĝo, eĉ plej bone pripensita, estus elemento malplibona, ĉar ĝi kaŭzus malhelpon en la hodiaŭa tutmonda spirita interkomunikiĝo. El kiu lingvo ia esperanta vorto estas ĉerpita, ĉu la vorto konservis en Esperanto la saman sencon, aŭ ricevis sencon alian, tio-ĉi fariĝis por la Esperantistoj tute indiferenta, ĉar ĉiu esprimas simbolo, asociiĝinte idee kun la responda objekto aŭ ideo, ricevis en Esperanto sian espriman koloron. La Anglo diras tute prave: „*A rose by any name would smell as sweet*“ (Kiel ajn ni nomus la rozon, ĝi kontrivus sian dolĉan bonodoron). Ekzemple mi scias, ke mi uzas „*acre*“ en lingvo franca en certa senco, sed parolante esperante mi kutimis asocii la sonon „akra“ kun la akreco del' tranĉilo. Tiel same parolante pole kaj ruse, mi uzas ofte la samajn vortojn en tute di-



ferencaj sencoj, kaj mi tamen ne kuraĝus fari pro tio ŝanĝajn proponojn.

Bedaŭrinde ni havas inter la Esperantistoj homojn, kiuj aliĝinte al Esperanto, rigardas ĝin kiel novan projekton, en kiu oni povas ankoraŭ ion aliigi, ion anstataŭi, ion modifiki. Krom tio ni havas ŝatindajn instruitajn homojn, kiuj dum la tuta vivo studis kaj komparis diversajn lingvajn projektojn, kaj kiuj metas Esperanton en la saman serion, forgesante aŭ ne volante kompreni, ke Esperanto ne estas jam lingva projekto, sed lingvo vivanta, posedanta gazetaron kaj literaturon, lingvo disvastigita sur la tuta tero kaj uzata por diversaj celoj. Tiuj instruitaj reformistoj memorigas al ni tiajn gepatrojn, kiuj, havante jam plenaĝajn idojn, neniel povas kompreni, ke iliaj infanoj estas plenkreskintaj, memstare pensantaj kaj agantaj individuoj. Ili vane perdas sian energion por ŝanĝi laŭ sia opinio kaj plaĉo tion, kio estis eble ŝanĝebla, sed nur en la frua infanaĝo.

Kiam la Delegacio ekdeziris decidi pri la akcepto de lingvo internacia kaj unu el miaj amikoj min demandis, kia estos laŭ mia opinio la rezultato, mi respondis: „Se la Delegacio akceptos senkondiĉe Esperanton, ĝi fariĝos subteno por la Esperantismo, se la Delegacio ekdeziros kontraŭstarigi al Esp. ion alian aŭ fari ŝanĝojn en E., ĝi faros fiaskon kaj perdos sian postenon kaj anaron.

Nun plenumiĝis la dua alternativo. Anstataŭ akcepti Esperanton la Delegacio prezentis al ni miksaĵon de diversaj revarmigitaj malnovaj reformaj projektoj baptitaj kiel lingvo de „Ido“ aŭ de du „Idoj“ kaj postulis, ke la Esperantistaro ilin akceptu; sed la Esperantistaro kune kun sia gazetaro restis fidela al la originala Esperanto de D-ro Zamenhof. El la Delegacia komitato ekŝiĝis preskaŭ ĉiuj ĝiaj plej gravaj membroj, restis nur la du aŭtoroj de l'projekto, kiuj ĝis nun ne komprenis sian eraron kaj esprimas sian malkontentecon pro la malvenko, kulpigante diversmaniere la Esperantistaron. Ni aŭdas do, ke la Esperantistoj estas konservatistoj, ĉar tion postulas iliaj materialaj interesoj; ke ili defendas Esperanton per ĝeneralaj argumentoj, sed

ne donas sciencajn pozitivajn kritikojn de la projekto de „Ido“, kiu laŭ opinio de ĝiaj aŭtoroj superas pro siaj bonecoj ĉion imageblan kaj estas nesuperebla. Kiel mi jam diris la Esperantistoj juĝas tute kontraŭe, sed eble ni ne estas kompetentaj, eble ni ne scias juĝi senpartie. Tial tre dezirinde estas, ke la aŭtoroj de Ido aŭdu la opinion de ne-Esperantisto, homo tute senpartia, fama lingvosciencisto, kiu partoprenis en la delegaciaj kunsidoj, kiel unu el la komitatanoj, nome la opinion de S-ro prof. Baudouin de Courtenay.

Mi ĉeestis dum lia publika parolado en Varsovio pri lingvo internacia, kie li disbatis ĉiujn antaŭjuĝojn kontraŭ tia lingvo, kaj nomis fine Esperanton la sola vera enkorpiĝo de tiu ideo. Nature estas, ke dum tia publika parolado la estimata profesoro ne povis detale kompari kaj priparoli diversajn reformajn projektojn, sed poste dum pli longa intervidiĝo, mi havis okazon aŭdi lian pli detalan opinion pri la lingvo de Ido kaj pri la diversaj ŝanĝoj, kiujn oni volus enkonduki en Esperanton. Mi donas malsupre la opinion de prof. B. de Courtenay kun lia konsento laŭ faritaj skribaj notaĵoj.

*La profesoro diris:* „Laŭ mia opinio ia lingvo internacia de Ido tute ne ekzistas, kaj mi ne povas aprobi la manieron de S-ro Ido, kiu ne memorigis eĉ per unu vorto, ke lia projekto ne estas projekto nova kaj sendependa, sed simple Esperanto modifika en kelkaj detaloj, modifika eĉ ne ĉiam feliĉe kaj prospere. Ĝenerale mi ne vidas en Ido, komparante ĝin kun Esperanto, efektivaajn plibonigojn. Esperanto originala prezentas en sia tutaj la stampon de neneigebla originaleco, kiun ni vane serĉus en la projekto de Ido.

En multaj punktoj „Ido“ estas malpli-valora ol Esperanto kaj prezentas ne progreson sed regreson. Tiel mi povus karakterizi la paragrafojn de la Ida gramatiko pri la alfabeto, artikolo, substantivo, adjektivo, personaj pronomoj, adjektivoj kaj pronomoj posesivaj, adjektivoj kaj pronomoj demonstrativaj, pronomoj relativaj—interrogativaj, adjektivaj pronomoj nedifinitaj, la verbo, la adverboj primitivaj, konjunkcioj kaj la nombroj.



La alfabeto de Ido pekas kontraŭ la principo de unueco kaj reguleco.

La litero *x*, flanke de *k*, *g*, *s*, kaj signifanta jen *ks*, jen *gz* estas tute ne allasebla.

Akcepti *q* flanke de *k* estas tia sama regreso (reakcio).

La litero *q* (sola aŭ en kombino kun *u*, kiel ekvivalento de *kv*) uzata apud *k* havas nek sencon nek povas esti filologie pravigita. La „*q*“ estas ĝenerale malfruiĝinto el tiu epoko en la vivo de la lingvo latina, kiam oni ankoraŭ diferencigis du tiajn guturalajn sonojn. Tiaj postolantaj kaj ĝenerale profundaj malantaŭaj paroldiferencoj malaperas ĉiam pli, kaj ĝi signifas nedisputeblan regreson, kiam oni penas enkonduki tiujn ĉi diferencojn en artefaritan lingvon tutmondan.

La infinitiva finiĝo—*ar* estas malbona kaj forĵetinda. Ĝi estas nur historia okazaĵo de la lingvo latina por unu grupo de verbaj temoj, dum la primitiva finiĝo komuna estis—*se*,—*re*. La historia tendenco de ĉiuj lingvoj neolatinaj kondukas al malpliigo kaj malapero de similaj finiĝoj. La infinitivo devas do reteni sian esperantan simbolon—*i*, se ĝi ne povas esti anstataŭita per nulo, t. e. egaligi al la formo radika. Nur unu sola infinitivo estas dezirinda. La malnovgreka abundeco ne povas esti tolerata en lingvo artefarita. Ni ne forgesu, ke tiu malnovgreka troa abundeco kaŭzis plenan malaperon de l' infinitivo en la lingvo novgreka.

La imperativo kun—*ez* estas absolute ne akceptebla.

Ĉe l' pronomo kaj ĉe l' adjektivo la signo de l' sekso estas superflua kaj mi ne povas aprobi la sistemon de Beaufront-Couturat.

Ĉe l' substantivo oni devas laŭ mia opinio konservi la substantivan signon „*o*“ ankaŭ en la pluralo; sekve mi ne aprobas la anstataŭon de „*oj*“ per—*i*.

Ĉar neniu el la ĝisnunaj reformaj pro-

jektoj superas la tradician Esperanton, ĉar neniu prezentas novan enkorpiĝon de la lingvo internacia, kaj ili, ne esceptante „Idon“ estas nur flik-laboroj, sekve adoptante principe Esperanton oni devas respekti la tradicion esperantistan kaj ne fari atencojn kontraŭ la kontinueco de tiu-ĉi tradicio. Ĉiuj ŝanĝoj, enkondukitaj rapide, malbonigas nur la tutajn kaj kaŭzas la neceson de novaj ŝanĝoj kaj modifikaĵoj.

Sed ĉiu ŝanĝebleco, ĉiu nekonstanteco, ĉiu ŝanceliĝo en lingvo internacia artefarita povas nur fortimigi la homojn, kiuj volas ĝin akcepti kiel ilon de tutmonda interkompreniĝo. Kvankam mi ĝenerale ne estas konservatisto, en tiu-ĉi okazo mi estas konservatisto decidita.

Ni povus ekzemple kritiki la lingvon francan kaj proponi kelkajn ŝanĝojn, se ne en la lingvo parolata mem, almenaŭ en la lingvo skribata (ortografio). Sed ni absolute ne povus realigi niajn proponojn sen la konsento de la francoj, t. e. de la parolantoj france.

La Esperantistoj devas esti rigardataj kiel asocio lingvista jam ekzistanta. Nenia komitato aŭ komisio ne-esperantista havas la rajton trudi al ili ŝanĝojn gramatikajn aŭ leksikajn. Se eĉ tiu komisio estus kunmetita el plej kompetentaj individuoj kaj plej bone elektitaj de diversaj delegacioj kaj sciencaj korporacioj ĝi ne ĉesus havi en la okuloj de Esperantistoj arbitran karakteron.

Post la volapükistoj ĝuste la Esperantistoj realigis la ideon de lingvo internacia en vastaj dimensioj kaj enkorpiĝis ĝin en formojn daŭrajn kaj akceptitajn de granda parto de la inteligenta homaro. *Kiu decidiĝas rompi la unuecon de la Esperantistaro, enterprenas paŝon tre riskan kaj, malbon-konsekvencan, sekve mi, volante eviti tiel gravan respondecon, estis devigita ekŝiĝi el la Delegacia konstanta Komisio“.*

Sapienti sat...

A. Grabowski.





## Esperanta statistiko.

Wiele osób nawpół przekonanych o użyteczności języka międzynarodowego i o zadziwiających zaletach Esperanta, ale jeszcze wahających się, zapytuje często: dlaczegoż to nasz niewielki i nie-szczęśliwy naród, który ma tyle ciężkich kłopotów w swym własnym domu, ma koniecznie brać na swoje barki tę olbrzymią międzynarodową pracę? Są przecież ludy od nas szczęśliwsze, bardziej zamężne i spokojne... My możemy poczekać, aż one to zrobią!

Nawet wśród naszych esperantystów słyszy się często pytania o stanie Esperanta w innych krajach, oraz wątpliwości, czy kraje te zajmują się tą sprawą, czy Esperanto staje się naprawdę środkiem porozumiewania się lub jest tylko zabawką kilku szczęśliwych ludów, które posiadają wiele czasu, spokoju i dobrego humoru?

Na te i tym podobne pytania należy się odpowiedź; wykazać trzeba, że idea ta znajduje wszędzie energicznych i oddanych pracowników i że żaden naród nie może i nie powinien stanowić wyjątku w tej wspólnej ludzkiej pracy.

Ponieważ najważniejszymi ogniskami ruchu esperanckiego są towarzystwa, od nich więc też zaczniemy statystykę esperancką.

I. Główne miejsce wśród naszych towarzystw należy do dwóch instytucji oficjalnych, któremi są:

*Stały Komitet Kongresów* (prezes dr. Zamenhof, sekretarz G. Moch, b. redaktor wielkiego dziennika „Indépendance Belge”, 8 członków);

*Esperancki Komitet Językowy* (prezesi: dr. Zamenhof i dr. Boirac, rektor uniwersytetu w Dijon, 90 członków).

II. Drugą grupę tworzą towarzystwa esperancko - narodowe, których celem głównym jest propaganda. Oto jest ich liczba według krajów:

Multaj personoj, jam duone konvinkitaj pri la utileco de lingvo internacia kaj pri mirindaj ecoj de Esperanto, sed ankoraŭ ŝanceliĝantaj, demandas ofte: kial do ni, malgranda, malfeliĉa nacio, kiu havas tiom da gravegaj klopodoj en sia propra domo, devas nepre preni sur siajn malfortajn ŝultrojn tiun ĉi grandegan internacian laboron? estas do multaj nacioj pli feliĉaj, pli riĉaj, liberaj kaj trankvilaj... ni ja povas atendi, ĝis ili tion ĉi faros!

Eĉ inter niaj esperantistoj oni aŭdas ofte demandojn pri stato de Esperanto en aliaj landoj kaj dubojn, ĉu ili okupas sin pri tiu ĉi afero, — ĉu Esperanto fariĝas vere internacia komprenilo, aŭ estas nur amuzaĵo de kelkaj feliĉaj popoloj, kiuj havas multe da tempo, da trankvileco kaj da bona humoro?

Al tiuj ĉi kaj similaj demandoj ni do devas respondi. Estas necese montri, ke nia ideo trovas ĉie energiajn kaj sindonemajn laborantojn kaj ke nenia nacio povus nek devus fari escepton en tiu ĉi komuna homa laboro.

Ĉar la plej gravaj centroj de la esperantista movado estas esperantistaj societoj ni komencas de ili nian esperantan statistikon.

I. La ĉefa loko inter niaj societoj apartenas al du oficialaj institucioj, t. e.:

*Konstanta Komitato de la Kongresoj* (prezidanto D-ro Zamenhof, sekretario Gaston Moch, 8 membroj).

*Esperantista Lingva Komitato* (prezidantoj D-ro Zamenhof kaj D-ro Boirac, rektoro de Universitato en Dijon, 90 membroj).

II. La duan grupon formas naciaj societoj esperantistaj, ĉefa celo de kiuj estas propagando. Jen estas ilia nombro laŭ landoj:



**EUROPA — EŬROPO.**

Aŭstrio—Austrija . . . . .	42	Hollando—Holandja . . . . .	8
Belgujo—Belgja . . . . .	32	Hungarujo—Węgry . . . . .	4
Britujo—Anglja . . . . .	102	Italujo—Włochy . . . . .	8
Irlando—Irlandja . . . . .	19	Malta—Malta . . . . .	6
Bulgarujo—Bulgarja . . . . .	16	Monako—Monako . . . . .	1
Danujo—Danja . . . . .	4	Norvegujo—Norwegja . . . . .	4
Francujo—Francja . . . . .	165	Polujo—Polska . . . . .	3
Germanujo—Nemcy . . . . .	58	Rumanujo—Rumunja . . . . .	1
Gibraltaro—Gibraltaro . . . . .	1	Rusujo—Rosja . . . . .	28
Hispanujo—Hiszpanja . . . . .	49	Svedujo—Szwecja . . . . .	20
Katalunio—Katalonja . . . . .	16	Svisujo—Szwajcarja . . . . .	44

**AZJA — AZIO.**

Hindujo—Indje . . . . .	7	Malajaj insuloj—Wyspy Malajskie	1
Japanujo—Japonja . . . . .	4	Tonkino—Tonkin . . . . .	1
Indohinujo—Indochiny . . . . .	1	Turka Azio—Turcja azjatycka . . . . .	3
Rusa Azio—Rosja Azjatycka . . . . .	3		

**AFRYKA. — AFRIKO.**

Algerio—Algier . . . . .	4	Madagaskaro—Madagaskar . . . . .	1
Franca Gvineo—Gwineja franc. . . . .	1	Transvaalo—Transwal . . . . .	1
Kanariaj Insuloj—Wyspy Kanar. . . . .	1	Tunizio—Tunis . . . . .	1

**AMERYKA. — AMERIKO.**

Bolivio—Bolivja . . . . .	1	Meksiklando—Meksyk . . . . .	4
Brazilio—Brazylja . . . . .	12	Peruo—Peru . . . . .	1
Ĉilio—Ĉili . . . . .	2	Urugvajo—Urugvaj . . . . .	2
Kanado—Kanada . . . . .	4	Unuigitaj Ŝtatoj—Ŝtany Zjednocz. . . . .	56
Kubo—Kuba . . . . .	1		

**OCEANJA. — OCEANIO.**

Aŭstralio — Australja . . . . .	2	Filipinaj Insuloj—Wyspy Filipińs. . . . .	4
		Nova Zelando—Nowa Zelandja . . . . .	4

W porównaniu z poprzednimi latami, dla których zbierane były dokładne cyfry, liczba towarzystw zwiększyła się znacznie, jak to wykazuje następująca tablica:

Kompare kun antaŭaj jaroj, por kiuj estis kolektitaj precizaj ciferoj, la nombro de societoj multe pligrandiĝis, kiel montras jena tabelo:

	1904 Febr. Luty.	1905 Jan. Stycz.	1906 Jan. Stycz.	1906 Jun. Czerw.	1906 Decem. Grudz.	1907 Jun. Czerw.	1907 Decem. Grudz.
Eŭropo—Europa . . . . .	103	173	276	368	434	542	743
Azio—Azja . . . . .	7	8	10	10	7	16	20
Afriko—Afryka . . . . .	1	2	3	3	6	6	9
Ameriko—Ameryka . . . . .	5	5	14	24	30	69	83
Oceanio—Oceania . . . . .	—	—	3	2	5	6	10
	116	188	306	407	482	639	865

Załączamy jeszcze ciekawsze liczby dla niektórych krajów:

Ni aldonas ankoraŭ interesajn ciferojn por kelkaj landoj:

Britujo—Anglja . . . . .	15	36	55	66	90	103	121
Francujo—Francja . . . . .	44	56	101	110	123	156	165
Hispanujo—Hiszpanja . . . . .	3	3	12	22	28	40	65
Svisujo—Szwajcarja . . . . .	2	6	9	23	30	39	44
Unuigitaj Ŝtatoj—Ŝtany Zjednoczone . . . . .	—	—	8	15	18	44	56



III. Trzecią kategorię tworzą towarzystwa o celach specjalnych: naukowych, artystycznych, handlowych i t. d. jak na przykład:

Międzynarodowe Towarzystwo katolickie; stowarzyszenie międzynarodowe esperantystów prawników; Liga międzynarodowa esperantystek dla ochrony kobiet (Szwajcaria); grupa lekarzy esperantystów (Paryż); Międzynarodowe Towarzystwo naukowe (Genewa); Stowarzyszenie prasy esperanckiej (Paryż); Francuskie Towarzystwo przemysłu i handlu (Paryż); Związek ociemniałych (Boston); Stowarzyszenie międzynarodowe studentów esperantystów (Petersburg) i in.

Liczba podobnych towarzystw wynosi obecnie 69.

IV. Prasa esperancka składa się obecnie z:

14 pism specjalnych, redagowanych całkowicie po esperancku;

30 pism propagandystycznych redagowanych po esperancku i w językach narodowych;

23 pism zwyczajnych, zawierających stałą kronikę po esperancku.

Zauważmy wreszcie, że 15 kongresów międzynarodowych poleciły lub wprost przyjęły Esperanto, jako język obrad, a 43 różne towarzystwa nie-esperanckie korespondują po esperancku. Zannotujmy pomiędzy niemi: Kongres Automobilizmu (1903), Kongresy Pokoju (1906, 1907), Kongres Fizjoterapii; Ligę francuską praw człowieka, Międzynarodowy Instytut pokoju, Uniwersytety ludowe; Unję katalońską i in.

V. Esperanckie konsulaty lub agentury istnieją obecnie w 232 miastach, mianowicie: w Europie—213, w Ameryce—11, w Azji—3, w Afryce—5. Według krajów największą liczbę znajdujemy we Francji (64), Anglii (34), Hiszpanji (24), Austrii (22), Szwajcarji (16). W Rosji są one w 8 miastach.

Widzimy, że ruch esperancki już objął całą kulę ziemską od północy do południa, od wschodu na zachód.

Uspokój się więc czytelniku: w żadnym z przytoczonych tu objawów tego ruchu kraj nasz nie zajmuje naczelnego miejsca!

III. La III-an kategorion formas societoj kun celoj specialaj: sciencaj, art-oj, komercaj k. a. kiel ekzemple:

Katolika Internacia Societo; Internacia Societo de esperantistoj juristoj; Ligo internacia de esperantistinoj por protekto de virinoj (Svisujo); Medicinista grupo esperantista (Parizo); Internacia Scienca Asocio (Genevo); Presa esperantista Societo (Parizo); Industria kaj Komerca Societo de Francujo (Parizo); Blindula Klubo (Boston); Internacia Societo de esperantistoj studentoj (Peterburgo) k. a.

La nombro de tiuj ĉi societoj estas nun 49.

IV. La esperantisa gazetaro konsistas nun el:

14 gazetoj specialaj, redaktitaj tute en Esperanto;

30 gazetoj propagandaj en Esperanto kaj naciaj lingvoj;

23 naciaj gazetoj, enhavantaj regulajn kronikojn en Esperanto.

Fine ni rimarku, ke 15 internaciaj kongresoj rekomendis aŭ akceptis uzon de Esperanto kaj 43 diversaj societoj ne-esperantistaj korespondos en Esperanto. Ni notu inter ili: Kongreso de Automobilismo (1903), Kongresoj de Paco (1906, 1907), Kongreso de Fizioterapio; societoj: Franca Ligo de rajtoj de homo, Internacia Instituto de Paco, Popolaj Universitatoj, Unio Kataluna k. c.

V. Esperantaj konsulejoj kaj agentejoj ekzistas nun en 232 urboj, nome en Eŭropo — 213, en Ameriko — 11, en Azio — 3, en Afriko — 5. Laŭ landoj la plej grandan nombron ni trovas en Francujo (64), Anglujo (34), Hispanujo (24), Aŭstrio (22), Svisujo (16). En Rusujo ili estas en 8 urboj.

Ni do vidas, ke la movado esperantista jam ĉirkaŭiris la teran globon de nordo ĝis sudo kaj de oriento ĝis okcidento.

Trankviligu, leganto: en suprecititaj faktoj vi nenie vidis nian landon sur la ĉefa loko!



Natosiast zdołaliśmy może przekonać, że, jak to powiedzieliśmy na początku tego artykułu, każdy, kto się czuje członkiem ludzkości, powinien się przyłożyć do tej wspólnej ludzkiej sprawy i że ani własne kłopoty, ani nawet nieszczęścia kraju nie mogą usprawiedliwić niczyjej obojętności.

A. Z.

Sed mi eble konvinkis vin, ke, kiel ni diris en la komenco de tiu ĉi artikolo, ĉiu, kiu sentas sin membro de l' homaro, devas kunlabori en tiu ĉi komuna homa afero kaj nek propraj liaj klopodoj nek malfeliĉoj de lia lando povus senkulpigi lian indiferentecon.

A. Z.

## Przed kongresem.

Nie wiele już czasu oddziela nas od kongresu Drezdeńskiego.

Czwarty kongres esperancki, jak pisaliśmy już o tym kilkakrotnie, rozpocznie się dnia 16 sierpnia i będzie trwał oficjalnie sześć dni. Czas już najwyższy, aby ci, którzy pragną bodaj raz wziąć udział w esperanckim kongresie, zapisali się na listę uczestników jego. Poprzednie kongresy odbywały się dość daleko od naszego kraju, to też skromna liczba polskich esperantystów ginęła niepostrzeżenie wśród stosunkowo znacznych cyfr innych narodowości. Drezdeński kongres, sądzimy, będzie pod tym względem pomyślniejszym dla nas. Nieznaczna odległość zapewne ściągnie poważniejsze zastępy polaków, którzy dziś już liczą pośród siebie bardzo dużo zwolenników Esperanta. Dotychczas na listę uczestników z Królestwa zapisało 15 osób, liczba ta prawdopodobnie znacznie się powiększy, gdyż kongres ten wzbudził już zainteresowanie w szerszych kołach esperantystów polskich. Tym, którzy jeszcze nie pomyśleli o wyjeździe do Drezna, radzimy dołożyć wszelkich starań, aby zwolnić się na tydzień kongresowy. Wydatki będą niewielkie, a to, czego będziemy świadkami, wynagrodzi nam w zupełności stracone koszta i czas.

W ostatnim numerze „Germana Esperantisto“ znajduje się już szczegółowy program kongresu. Podzielimy się z naszymi czytelnikami najciekawszymi szczegółami.

Przedewszystkim kongres w Dreźnie, sądząc z dotychczas osiągniętych wyni-

ków, będzie miał charakter oficjalnie-urzędowy.

Zarząd miasta udzielił do rozporządzenia uczestników kongresu najpiękniejsze gmachy w mieście. W „Vereinshaüs“, wspaniałej sali miejskiej, odbędzie się otwarcie i zamknięcie kongresu. Sala będzie ozdobiona flagami 30 państw, których konsulowie przyrzekli swój współudział w kongresie. W imieniu miasta przywita kongres burmistrz Drezna Koch.

Dla mniejszych posiedzeń i zebrań sekcyjnych otwarte będą sale Instytutu Technicznego — jednego ze wspanialszych gmachów Drezna.

Miasto poważnie przygotowuje się do przyjęcia gości z całego świata. Z rozporządzenia dyrektora policji 24 policjantów nauczyło się języka Esperanto dla ułatwienia uczestnikom kongresu orjentowania się w mieście. Policjanci ci będą mieli na rękawach białe opaski z zieloną gwiazdą. We wszystkich prawie hotelach i restauracjach kelnerzy uczą się już języka Esperanto. Jednym słowem esperantyści będą mogli cały czas Kongresu spędzić w Dreźnie, posługując się wyłącznie językiem Esperanto.

Powodzenie kongresu jest również zapewnione materjalnie. Na propozycję posła D-ra Zöphel'a, władze Drezna postanowiły poprzeć zjazd znaczną subwencją.

Z ciekawszych numerów programu, który obfituje w wiele niespodzianek, należy przytoczyć przedewszystkim przedstawienie teatralne, które będzie wykonane po raz pierwszy przez zawodową



